

RAKONTO KIU VAGAS TRA LA MONDO

Sankta patro¹, kvankam mi anoncas mni al vi nun, mi anoncas min al vi por ĉiam. Mi anoncas min el fundo de la universo, kie mi vivas per transa kaj ĉi-monda vivoj, tiel ke mi ne scias kie mi estas. Mi anoncas min el la freneza domo, kien oni dumvive prem-enigis min, mi eĉ ne sciis ke mi estas en la frenezulejo, ĉar ĉio estis normala, kaj la domo havis efektive misformitajn fenestrojn. Kiam la mondon ŝanĝis, la frenezo pludaŭris en mia kapo, en kiu estas ĝenerala kaoso. Mi estas en la frenezulejo, sed ne estas freneza. Eĉ en ĉi-mondo, kie mi estas kvazaŭ viva, estas pli bone, ol en tiu via, tie. Sed la rememoroj perfidis min, tiel ke mi ne scias kiu mi estas, nek kies mi estas. Mi ne scias ĉu mi estas naskita kiel katolikino aŭ mi estas konvertita en katalokinon, kiam okazis reveno de greko-ortodokssuloj al kredo de patroj. Kiam ili neŭnuigitaj estis konvertataj al katolikismo, en kiu ili povas trovi eternan savon. Mi ne scias ĉu mi estas kroatino en la korpo de serbino, aŭ inverse, nek kies nomon mi portas, la mian aŭ la konfirmacian.

La nomo estas malvero, kaj Dio estas vero.

Sankta patro, mi prezentas min kiel Dobrila Martinović, kiel instruistino kiu oficis en Popola elementa lernejo, kiun frekventadis katolikaj infanoj kaj infanoj de greko-ortodoksa konfesio. Kaj Popola elementa lernejo troviĝis en Ŝargovac apud Banja Luka, kiu, kiam establiĝis Sendependa Ŝtato Kroatio, devis esti ĉefurbo de tiu ŝtato kaj nomiĝi Antigrad. Iuj estos kredigantaj vin ke tio estas Ante-Urbo, sed tio ne estas vero. Mi asertas tion al vi el mia kapo, el la dresita frenezulejo.

La historio estas malvero, kaj Dio estas vero.

Sankta patro, tiutempe, en tiu nove kreita ŝtato, en ĝi povis vivi neniu alia ol kroatoj. Kiu ne volis esti konvertita, la ustaŝoj sciis kien kun li/ŝi. Tiam ne estis peko mortigi sepjaran infaneton, se li/ŝi ĝenis la ustaŝan progreson. Kaj greko-ortodoksaj infanoj, tiu valaĥa¹ idaro, ĝenis. Ĉar *greace ides, nula fides*, ĉar *la greka religio estas nula religio*, endis forbalai tiujn katolikajn degenerintojn per metala balailo el Popola elementa lernejo en Ŝargovac, kie mi, malfeliĉe, estis instruistino. Kaj via eklezio, por krei *Civitas Dei*, aprobis metalan balailon, kaj eĉ apelaciis, konfidante al via graco, por doni absolvon al tiuj kiuj en sia patriota laboro kelkfoje transpasis malvastajn limojn de la religiaj moralo kaj etiko.

Absolvo estas malvero, kaj Dio estas vero.

Sankta patro, la sepan de februaro laŭ Gregoria kalendaro, 1942 penetris en la lernejon Ustaŝa roto de la Dua korpuno de Ante Pavelić, al kiu komandis la mallaŭda esprimo por ortodoksaj serboj ĉefleŭtenanto Josip Mislov, la rotestro Nikola Zelić, kaj iu parokestro el la monakejo Petrićevac, kien vi iros por beatuligi, respektive sanktuligi la katolikan laikon Ivan Merc, kiu ŝatis la Eklezion kaj Vikarion de Kristo, kiu batalis por Apostola Seĝo, kaj aĝle montris sunvojon al la kroata junularo. Sanktuligi, tiel oni diras. He, tiu ia parokestro el la monakejo Petrićevac estis frat' Miroslav Filipović, kvankam aliaj pensas ke li estis frat' Tomislav Filipović, kaj la triaj ke li estis frat' Vjekoslav Filipović. Sed ĉiuj tiuj pensoj estas senefektaj, ĉar temas pri unu sama Satano. Satano kies nomon Dio forlasis.

1 Temas pri la papo Johano Paŭlo II, kiu alvenis la 22-an de junio 2003 en Banja Luka por en la monakejo Petrićevac beatuligi Ivan Merc, katolikan laikon, en lia naskiĝurbo. Por sanktuligi Ivan Merc, kiu jam en la fora jaro 1928 mortis, kaj kiu tenadis la devizon *Aŭt Catholicus aŭt nihil, Aŭ katoliko aŭ nenio*, sur la loko kie tiam, kiam estis formita la ustaŝa kreitaĵo Sendependa Ŝtato Kroatio, dum la Dua mondmilito, okazis la 6-an de februaro 1942 la kunveno, kiun gvidis la frat' de la monakejo Vjekoslav Filipović. Dum tiu kunveno estis farita la decido por efektiviĝi la morgaŭan tagon, la 7-an de februaro, amasbuĉadon de serbaj gevivantoj sur la teritorio de la apudurbaj vilaĝoj Drakulić, Motike kaj Ŝargovac, kio ĝuste estis farita, kiam dum unu tago, sub gvido de la frat' Filipović, estis mortigitaj, buĉitaj, masakritaj 2.298 viroj, virinoj kaj infanoj de la serba nacieco.

Satano estas malvero, Dio estas vero.

Sankta patro, la frat' Satano devigis min preni la klaslibron kaj apartigi la infanojn de greko-katolikoj disde la katolikaj infanoj, apartigi la infanojn kiujn mi ŝatis pli ol ĉi tiujn okulojn per kiuj mi rigardas. Apartiginte ilin, mi ne scias kio okazis kun la infanoj. Oni diras ke nigroĉemizuloj, mi tion ne vidis, devigis, cele de havigo de la tuteca ustaŝa edukado, ke la katolikaj infanoj, kvazaŭ al ia leciono, ĉeestu al tiu trista prezentaĵo, rigardu kiel putinaj filoj mortigantis iliajn gesamaĝulojn, sed mi ne scias kiel tiuj mortigantis ilin, nek ĉu ili sin mem aŭ ilin mortigis. Kaj mi ne scias kie, ĉu en la lernoĉambro, en la koridoro, sur la ŝtuparo, en la lernejkorto, aŭ sur la paĝoj de legolibro. Mi nur rememoras iliajn benajn okulojn, la rigarson kiu vepetis ke mi helpu al ili, kaj mi ne povis helpi al ili, dum la ekzekutistoj forlokantis iajn klabetojn de unu mano al alia, kaj mi ne povis helpi al ili.

Tio estas la plej terura bildo kiun mi en mia rememoro kunportis el via mondo, ĉar mi delonge ne estas el ĉi-mondo.

Kio pluestis, tio en la rakonton ne enigebblas. Kio estas eksterracia, tio ne estas rakontebbla.

Rakonto estas malvero, kaj Dio estas vero.

Sankta patro, estis lumdisa luno, luno februara kaj estis multe da neĝo, ĝi kovris la tutan mondon, ĝi ariĝis ĝis la zono tiam, kiam la nigroĉemizuloj penetris en la lernejon. Neniu el ili, vizaĝe, havis ian ajn firman koloron. Se mi scipovus desegni karikaturojn, mi desegnus ilin kiel blatojn, sed mi ne scipovas. Mi eĉ ne scipovas priskribi ilin, la prikribo ne ampleksus ilin. Eĉ la vortoj kiel fihomoj, kanajloj, fetoruloj aŭ malpuraĵuloj ne atingas ties sencon.

Tio estas tiel trista.

Sankta paĉjo, vortoj estas malvero, kaj Dio estas vero.

Ili estis ĝisdente armitaj, kaj ĉiuj, escepte de tiuj kiuj kondukis ilin, laŭparole mi konkludis, estis el Hercegovino. Poste iuj rakontis ke neniu el ili pafarmilojn ne uzis, por ke la infanoj ne ektimigu. Mi ne scias kial poste multaj rakontis ke ili mortigadis la infanojn, kiuj apenaŭ komencis vidi, per tranĉilo kiu momiĝis pikilo, ustaŝa pikilo, per bastonegoj, hakiloj, forkegoj, bajonetoj, kaj plejofte per metala globo je ligna breto nomata serbobatilo. Kaj tiuj rakontis ke ili mortigadis ekskluzive per malkraj objektoj, por ke tio estu neaŭdebla. Mi tion ne povas atesti. Mi nur rememoras iliajn okulojn kiuj peto de indulgo. Tiujn okulojn mi neniam forgesos. Okulojn en kiuj estis timo, veo, teruro, mortado! Kaj ankoraŭ unu detalon mi rememoras. Mi rememoras ke al unu el la buĉantoj, kiu enmane tenis serbobatilon, sango ruĝigis tranĉitajn ungojn kaj ke la alia buĉanto eksaltis paŝon malantaŭen por ke ne ŝprucigu lin la diskrevinta infana cerbo el la rompita kapo, kaj ke neĝo sorbantis la infanajn kriojn.

La ceteron mi ne rememoras. Escepte de nur iliaj okuloj kiuj en songhoj min pelis, kaj ŝajnis min esti malsaĝonta.

Neniu krimo povas esti tiel kruela kiel de tiu kiu ĝin faras.

Krimo estas malvero, kaj Dio estas vero.

Sankta patro, ne estas vero tio ke la itala konsulo anoncis en sia ampleksa raporto ke la 7-an de februaro 1942 estis mortigitaj en Popola elementa lernejo 56 ortodoksaj infanoj. Nek tio ke la pedantaj germanoj notis ke estis mortigitaj 53 infanoj. Komprenu min, en la stato en kiu mi estas, mi ne povas marĉandi per la viktimoj. Germanoj estus pravaj se Kuruzović Dragica tiutage estus veninta en la lernejon, sed ŝi ne venis. Tiutage ŝi foriris al al onklino en Borik, kaj ne estis buĉita. Mi atestas al ci el tiu alia mondo, ĉar neniu ĉi-monda konsidero ne devigas min por ne paroli veron.

Matematiko estas malvero, kaj Dio estas vero.

Sankta patro, kiam mi ĝisvivis tiun honoron por mLSaĝiĝi, ĉio estis finita. Sed mi ne malsaĝiĝis pro tio ke mi ne povis pluhavi bildojn kiuj en mia larmo senĉese speguliĝis, ke mi vidis scenojn kiuj forlavis de la homo ĉion efemeran kaj per granda energio sugestas sencon kaj absurdon de la vivo, sed tial ke mi frenezigiĝis tiam kiam la homa finaskitaro post masakro devigis min propramane enskribi en la

Ĉefnomliston, kiu transformiĝis en Sangan nomvokliston, apud la nomo de ĉiu buĉita infano ke li/ŝi mortis laŭnature! Por tiu parto mi konfesas miajn pekojn.

En nomo de Jesuo Kristo kaj Virgulino mi petas absolvon.

Plejpotenculo prijuĝu min.

De tiam mi estas nekonsilita. De tiam mi ne povas kvietiĝi, kaj mi neniam kvietiĝos, nek savos min.

Tiu malprudenteco estas mia puno. Ĝi aliĝis en sentecon kiu dispecigis min, tiel ke mi tute foriĝis de mia perfekteco. Pro tio kiel mi frezeziĝis, tre malmulte mi scias. Verŝajne tio kio antaŭis ne povis esti forgesita. Tage kaj nokte mi diskredadis nerve.

La nervoj estis al mi streĉaj, tiel ke ili pulsegis per teruro. Mi sentis min ĉiel, eĉ kiel hundeto.

Por min konsoli, mi sonĝis ke mi estas nenio, sed eĉ tio ne helpis. Mi scias momenton kiam korpo plektiĝis en la nervan sistemon, kiam ĝi enfiksiĝis en milon da malordigitaj vejnoj, kiam mi komencis rezisti spirado, kiam mi ekpensis ke mi ĉion ĉi ne povus supervivi, kaj ne ankaŭ ĉi tion, mi ĝuste scias kiel mi sentis min kiam oni proklamis min transmonda kaj poste en malespetron enmasonis.

Nun mi estas el transa mondo, en mia definitiva mondo.

Homo povas ĉion supervivi ecepte de la morto.

La morto estas malvero, kaj Dio estas vero.

Sankta patro, ĉar vi kiel pilgrimanto vojaĝadas tra la mondo, ĉar vi kiel vojaĝanta papo okupiĝas pri la komerco de indulgencoj kaj elaĉeto de akcioj, kaj pri absolvo de pekoj, nur iu kiu vidis kaj unu kaj la alian flankon, kiu vivas ĉi-mondan kaj la transmondan vivojn, havas rajton por diri al vi : rezignu pri vojaĝado, rezignu pri kisado de ekflugejo kaj levado de infanoj kun amelitaj ĉerizetoj kaj puntaj jupetoj super vin kaj karesado de iliaj hararoj, rezignu pri benado de kredantaroper levado de mano – fikse ekrigardu al la eterneco. Sufiĉas al mi senco, sufiĉas al mi falsa moralo, sufiĉas al mi larmoj je l' entombigo ĝenerala.

El la amasbuĉado neniam iu ajn justeco naskiĝis, kaj ne iĝos ankaŭ el ĉi tiu. Iam mi ne sciis, sed nun scias ke ekzistas nek oriento nek okcidento, sed ke ekzistas nur Vatrikano.

Kiam mi eksciis ke vi kiel vojaĝanta atestanto de evangelio venantas al la loko kie la krimo estis semita, ke la persono de via reputacio venos al la loko kie dum la tago antaŭ la amasbuĉado okazis la kunveno kiun partoprenis la eksa ĉefparokestro Viktor Gutić, Banjaluka-parokestro D-ro Nikola Bilogrlić, tribunalprezidanto Stilović kaj pluraj sacerdotoj, mi esperis ke vi nome de Roma kurio vizitos ankaŭ Popolan elementan lernejon en Ŝargovac. Ke vi venos al la loko kie la krimo estis farita sub la protekta rigardo de Sankta Seĝo. Ke vi venos al la hodiaŭa Serba Milanovac, al la loko de kadavroj kaj fumo, kie la senpeka sango de Kristo fluegis, kie ardaĵoj estis estingataj, por ke vi riverencu al la trono kie unu lernejo estis buĉita. Ke vi venos por aŭdi voĉojn de la buĉitaj infanoj kiuj vagas tra la lernejo, por ke vi aŭdu ilian mortan bruadon, iliajn mortajn ĝojojn, iliajn mortajn kantetojn kiujn ili kantadis kaj recitadis. Mi estis preparinta kartonon, ne kartonon, sed ordinaran gazetpaperon, sur kiu estis nomoj de la buĉitaj infanoj, sed oni ne permesis ke mi starigu ĝin, ie ajn pendigu. Nenie, nek je la afiŝtabulo, nek je la enirpordo, nek mi alkroĉu ĝin je iu ajn arbo en la lernejkorto.

Nek eĉ je la lerneĵ-ĉirkaŭbarilo.

Nur ne demandu min kiu ne permesis. Imagu, ne permesis Ministerio de klerigo de Respubliko Serba. Loka komunumo estis por tio, ankaŭ la civitanoj, kaj Lernejestraro kaj la lernejkomitato, kaj ne Ministerio de klerigo.

Oni diris, ne estas tempo, por tio. Ni devas konstrui pontojn, la elfrotita papero kun la nomoj de la buĉitaj infanoj ree maltrankviligos la spiritojn. Se la serba vero devas vidiĝi, tiam ne estas tempo! Sed estas tempo! La tempo, kiom ĝi pli multe pasados, la rakonto pri la buĉitaj infanoj tiom pli ofte vagados tra la mondo kaj tiom pli multe pikados la homan konskiencon.

Ĉar ekzistas rakontoj kiuj neniam povas malnoviĝi. Ili moviĝas, sed ne forlokiĝas. Tiaj rakontoj povas mem supervivi, povas defendi kontraŭ enpikoj, kontraŭ askaridoj, bedaŭrajhoj kaj malicaj potencoj, kaj povas daŭri senfine.

Ili povas esti nek bruligitaj, nek neniigitaj nek perditaj.

Ili ne povas esti enfositaj, kaj tiel forviŝitaj.

Ne povas la buĉitaj infanoj esti igitaj sennomaj, ne povas ili pro io ajn esti elŝutitaj en malplenon.

Sankta patro, la gazetpapero ne estas malvero! Neniu neĝo povas ĝin surkovri, neniu vento povas disŝiri, neniu pluvo povas forlavi, neniu suno povas forardigi, neniu fajro povas forbruligi, neniu herbaĉo povas ĝin kovri, kiom ajn ĝi estus malfirma kaj poreca. Kiom ajn ĝi palus, pereadus kaj putrus, sub ĝi reaperadus la nomoj de la gemortintoj, ĉiam pli klare, same kiel maizrostkrevaĵoj rostkrevas.

Radojka, Simeŭn, Jovan, Jelena, Duŝan, Duŝan, Jovanka, Duŝan, Dragomir, Mara, Milan, Ostoja, Mileva, Ďuro, Milan, Duŝan, Gospava, Dragica, Radmila, Milorad, Ostoja, Slavko, Duŝan, Zorka, Gojko, Zdravko, Milan, Ostoja, Branko, Dragica, Slavka, Ljubica, Mileva, Mara, Mitar, Darinka, Nada, Sveztozar, Branko, Vjdosava, Jovan, Miloŝ, Zdravka, Stamena, Anka, Branko, Mileva, Marija, Nada, Živko, Milan kaj Milivoje.

La justeco devas ekzisti en iu pli supera formo.

Devas ekzisti iu juĝisto kiu ne eraras.

Bonan nokton, Patro!

Esperantigis Boriŝa Miliĉević